

Enhavo – obsah:

La 16-a Internacia Esperanto-Konferenco	2
V. Ludíková: Pošli to dále – Sendu ĝin pluen	5
B. Němcová: Saĝa montaranino	6
Z. Bergrová: Fontano ne estas lavabo	10
Z. Bergrová: Ŝimmi	12
J. Karen: Serĉado de la Blua Tono	16
Č. Vidman: A ještě fotografie	19
Č. Vidman: Pocta Janu Nerudovi	22

---

**Agrablan kaj ĝojplenajn Kristnaskajn festojn  
kaj pacon, feliĉon kaj sanon en la Nova jaro 2004  
al ĉiuj membroj de la klubo kaj al ĉiuj legantoj de la Bulteno  
deziras la komitato de la Esperantista Klubo en Praha**

La regulaj kunvenoj de la Esperantista Klubo en Praha okazas ĉiuĵaŭde en la kunvenejo en Praha 1, Ve Smečkách 25 kun la jena programo: 13 – 14 h Libera tribuno – novaĵoj pri la movado, ĝeneralaj informoj, organizaj aferoj, ambaŭlingve 14 – 16 h Gramatiko kaj ekzercado de konversacio, nur en E-o 16 – 18 h Kurso por komencantoj – gvidas s-anino Šmidrkalová, por la ceteraj estas Libera tribuno.

Pravidelné schůze Klubu esperantistů v Praze se konají každý čtvrtek odpoledne v Praze 1, Ve Smečkách 25

**La 16-a Internacia Esperanto-Konferenco (IEK)**, aranĝita de Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK), okazis en Prago, en la hotelo Opatov, de la 19-a ĝis 25-a de julio kun partopreno de kvardeko da fakuloj pri la Esperanta literaturo el ok landoj. La konferenco okupiĝis pri la „Intimaj Temoj en la Esperanto-Beletro“.

La honora gasto de la konferenco estis la praga poetino kaj verkistino Eli Urbanová, kiu prezentis al la ĉeestantoj kaj subskribis sian plej novan poemaron „Rapide pasis la temp““. Pri ŝia vivo kaj verkaro prelegis Miroslav Malovec, la redaktoro de la asocia organo Starto. La intimajn temen en la ĉeĥa poezio koncernis ankaŭ la prelego de Vlastimil Kočvara pri la poeto K. H. Mácha kaj lia poemo „Majo“, la preleganto komparis la du Esperantajn tradukojn de Majo.

El la eksterlandaj prelegoj ni menciuj tiujn de Eugene de Zilah pri Kial malkaŝi ĉion, de Maria Butan pri La atendo riĉa je emocioj kaj de Christian Declerck, kiu prezentis tri prelegojn: la unuan pri la Intimeco aletra, la duan pri Intimaj temoj en fikcio kaj biografio, kiun daŭrigis la tria: la prezento de lia plej nova romano „Tarokoj kaj epokoj“, parte filozofia kaj parte aŭtobiografia.

Tre interesan kaj malkovran prelegon prezentis Gerrit Berveling, remonstranta pastro el Nederlando, pri la Intimaj temoj en la Biblio; li montris, ke la Biblio estas ne nur grava verko, sed ankaŭ vere interesa legaĵo. Krome G. Berveling prezentis siajn verkojn, la duvolumajn Duakanonajn Librojn, kiuj enhavas la Esperantan tradukon de tekstoj ne envicigitajn en la Bibliion, kaj du volumen de Antologio Latina, enhavantajn fragmentojn el la verkoj de latinaj aŭtoroj, de Livio Androniko al Tito Makio Plaŭto kaj de Publio Terencio Afro kaj Kajo Valerio Katulo. La tradukan laboron li daŭrigos kaj sekve ni povas atendi, ke aperos pluaj volumoj de Antologio Latina en la Esperanta traduko.

La konferencanoj ĝuis ankaŭ la trarigardojn de historiaj partoj de Prago, dimanĉe la 20-an de julio posttagmeze okazi sen la preĝejo de S-ta Nikolao sur la Malnovurba placo de Ekumena Diservo en Esperanto. La meson servis la Esperantaj pastroj Albrecht Kronenberger kaj G. Berveling kaj kun ili en modela Esperanto ankaŭ la loka husana pastoro Miroslav Nytra kune kun laika evangelia frato Pavel Polnický. Esperantlingve kantis Miroslav Smyčka.

La vesperaj programoj de la konferenco konsistis el koncerto de oper- kaj operet-arioj en Esperanto fare de M. Smyčka, el diversaj E-lingvaj videoprogramoj, aŭ fine el la Greka vespero kun la greka muziko kaj gustumado de tipaj nekaj frandaĵoj kaj trinkaĵoj.

La ĉi-jara OSIEK-premio estis atribuita al Gerrit Berveling pro la Antologio Latina. Ni memorigu, ke antaŭ du jaroj la saman premion ricevis Eli Urbanová pro la aŭtobiografia romano „Hejtaro danca“.

La venontjara 17-a IEK estos aranĝita en la hungara Pécs, kaj la 18-a IEK okazos en 2005 en la greka urbo Rafina.

**16. mezinárodní esperantská konference (IEK)**, uspořádaná Organizační společností Mezinárodních esperantských konferencí (OSIEK), se konala v Praze, v hotelu Opatov, od 19. do 25. Července za účasti čtyřicítky odborníků na esperantskou literaturu z osmi zemí. Konference se zabývala „Intimními tématy v esperantské beletrii“.

Čestným hostem konference byla pražská básnířka a spisovatelka Eliška Urbanová, která účastníkům představila a podepisovala svou novou sbírku „Rapide pasis la temp“ (Rychle uplynul čas). O jejím životě a díle přednášel Miroslav Malovec, redaktor svazového orgánu Starto. O intimních tématech české poezie pojednávala i přednáška Vl. Kočvary o básníku K. H. Máchovi a jeho básni „Máj“; přednášející provedl porovnání dvou esperantských překladů Máje.

Ze zahraničních přednášek připomeňme vystoupení Eugena de Zilah Proč odhalovat všechno, Marie Butanové Očekávání bohaté na emoce a Ch. Declerka, který přednesl tři přednášky: první o Intimnosti v beletrii, druhou o Intimních tématech ve fikci a biografii, na kterou navazovala třetí: představení jeho nejnovějšího románu „Taroky a epochy“, zčásti filozofického a zčásti autobiografického.

Velice zajímavou a objevnou přednášku přednesl Gerrit Berveling, remonstrátský kněz z Nizozemska, o Intimních tématech v Bibli; ukázal, že Bible je nejen významné dílo, ale také opravdu zajímavá četba. Mimo to G. Berveling představil svá díla, dvousvazkové Druhokanonické knihy, které obsahují esperantský překlad textů nezařazených do Bible, a dva svazky Latinské

antologie, obsahující ukázky z děl latinských autorů, od Livia Andronika po T. Maccia Plauta a od P. Terentia Afera po C. Valeria Catulla. V překladatelské práci pokračuje a můžeme tedy očekávat, že vyjdou další svazky Latinské antologie v esperantském překladu.

Účastníci konference využili rovněž prohlídek historických částí Prahy; v neděli 20. července odpoledne se konala v kostele sv. Mikuláše na Staroměstském náměstí ekumenická bohoslužba v esperantu. Mši sloužili esperantští kněží Albrecht Kronenberger a Gerrit Berveling a spolu s nimi ve vzorném esperantu i místní husitský kněz Miroslav Nytra spolu s laickým evangelickým pomocníkem Pavlem Polnickým. Esperantsky zpíval Miroslav Smyčka.

Večerní programy konference tvořily koncert operních a operetních árií v esperantu, které zazpíval M. Smyčka, různé esperantské videoprogramy, nebo konečně Řecký večer s řeckou hudbou a ochutnávkou typických řeckých laskomin a nápojů.

Letošní prémie OSIEK byla udělena G. Bervelingovi za jeho Latinskou antologii. Připomeňme, že před dvěma lety stejnou premií obdržela Eliška Urbanová za autobiografický román „Hetéra tančí“.

Příští rok bude 17. konference IEK uspořádána v maďarském Pětikostelí, a 18. konference bude v roce 2005 v řeckém městě Rafína.

## Praha-ek-2003-03-03

- 03 -

### Nové knihy

Pražské nakladatelství Eminent vydalo knihu Jaroslavy Urbanové a Štěpána Raka „Kytara má láska“, věnovanou Štěpánu Urbanovi, významnému českému skladateli a kytarovému virtuozovi. Štěpán Urban byl profesorem hry na kytaru, zakladatelem kytarového oddělení na konzervatoři. Byl autorem řady skladeb pro sólovou kytaru, pro klavír, pro zpěv a kytaru i pro symfonický orchestr. Složil i čtyřicet písní na esperantské texty.

Je velkou zásluhou prof. Štěpána Raka, že v této knize vzdává hold svému učiteli Štěpánu Urbanovi a přitom bohatě cituje z jeho vlastního díla. Píše: „Profesoru Urbanovi se podařilo vytvořit původní českou kytarovou školu a připravit jak na poli sólistiky, tak i publikační činnosti cestu mladé generaci.“ A cituje Urbana: „Kytara je láska mládeže celého světa. Tak jak ji milovali mladíci a dívky starého Řecka před tisíciletími, tak ji v obměněné a moderně vyvinuté formě miluje i dnešní mládež.“

Štěpán Urban byl také astrolog, i tomuto jeho zájmu je věnována značná část knihy. Škoda jen, že se v knize nenašlo více místa i na další Urbanův zájem: byl esperantským básníkem a spisovatelem. I jeho první manželka Eliška Urbanová je významnou světově proslulou esperantskou autorkou. O tom všem se kniha jenom stručně zmiňuje, nicméně jsme rádi i za toto málo. Knihy „Kytara má láska“ si zaslouží, aby ji četli nejen esperantisté, ale všichni fandové hry na kytaru.

„Kantoj por ĝojo“ (Písničky pro radost) je sličný kapesní zpěvníček písniček všeho druhu, který sestavila Stáňa Chrdlová, která se však vydání zpěvníku už nedožila. Třicet písniček i s notami, které byly do esperanta přeloženy z různých jazyků, tradičně vtipně ilustroval Pavel Rak. Zpěvníček vydalo nakladatelství KAVA-PECH v Dobřichovicích.

Stejně nakladatelství vydalo novou učebnici Jany Melichárkové „Esperanto pro děti“. Bohatě ilustrovaná učebnice v třiceti lekcích přináší základní slovní zásobu a různými hrami a domalovánkami udržuje zájem dětí o učení. V závěru jsou různé básničky (Polámal se mraveneček) a říkanky vtipně tlumočené Miroslavem Malovcem. Učebnici pěkně ilustrovala Miroslava Tomečková.

Nakladatelství KAVA-PECh vydalo také reprezentativní publikaci „Doksy a Máchův kraj“ Renaty Mauserové a Vladimíra Richtmorce. Kniha slouží městu Doksy k propagačním účelům. Obsahuje také kapitolu o významných rodácích, mezi nimiž nechybí ani Václav Špůr, organizátor někdejších Letních škol esperanta na Máchově jezeře. Takže kniha je zajímavá i pro esperantisty.

esperanto en vendômois

Internacia konkurso: infandeseĝnaĵoj  
2003 vendôme francio  
Partopreno-atesto

Kategorio: \_\_\_\_\_ A \_\_\_\_\_


Atribuita al: \_\_\_\_\_ *Dája* \_\_\_\_\_

Louise Sauvé

Marc Noulin

En la Internacia konkurso de infandeseĝnaĵoj partoprenis ankaŭ la hundineto Dája de nia s-anino Pavla Zemanová. Ĝi ricevis diplomon, kiun ni prezentas kaj por nia Bulteno ĝi desegnis bildon, kiun ni montras bedaŭrinde nur nigra-blanke. Al Dája ni gratulas kaj dankas.

Por Bulteno  
desegnis  
kvarpieda ano  
de Praga klubo  
Dája



Věra Ludíková

### Pošli to dále – Sendu ĝin pluen

Por ke vortoj disvastiĝu kiel la cirkloj sur akvo, sendu ilin pluen. Bonajn vortojn, tiajn, per kiuj vi transdonas lumon kaj esperon. Disvastigu la amon kaj esperon en pentrita formo, ĉar, kiel diras ĉina proverbo, unu bildo estas pli ol trimil vortoj. Se vi vere travois ion malbonan, kiam vi sukcesis super la malbono kaj kapablis pardoni, vi havas eĉ devon dividi tiun ĉi sperte kun aliaj, diri ĝin al pluaj kaj fortigi ilin tiel. Helpu, mi petas, al la malfidemaj, kiuj dronas kiel muŝo en kulero da akvo kaj ne estas kapablaj vidi la mondon belega, ankaŭ la misteran Universon de la Dio kreitan, ili ne vidas la malfermitan dian ĉirkaŭbrakon, ili ne konas la Amon celantan de la Dio al ni. Tio estas ekzamenoj, per kiuj, konkerinte ilin, vi spirite kreskas, kvazaŭ naskiĝas Kristlo en solvaĵo nur en la momento, kiam ĝi estas saturita. Sendu ĝin pluen. Sendu sciigon veran, sendu ĝin rapide kaj sendu ĝin en konciza formo, ĉar la tempo akiras rapidon, sed samtempe mallongiĝas ĝuste tiu, kiu estas al ni donita por la transformo de ĝenerale rekonataj valoroj. Precipe se vi estas honorita per la donaco de vorto, se vi regas penikon aŭ eĉ se vi ekkonis la Favoron de la kreado kaj klarvido samtempe, mi petas, avertu la ceterajn! Inspiru ilin! Diru al aliaj pri la dia amo kaj transdonu ĝin pluen! Tiaj voĉoj estas kvazaŭ malmulte aŭdeblaj, kaj eĉ ŝajnas, ke ili perdiĝas en la materiala socio, kiu scias nenion pri malteniĝo.

La ideojn mi formuli sen formo de teksto „Sendu ĝin pluen“ kaj publikigis printempe de 2002 dum la aŭtora vespero de la libro „Estas printempo“, tradukita en 36 lingvojn. Sinsekve mi invitis konatajn personulojn al kontribuajtoj, por ke ili povu estiĝi libro de komunikoj al la estontaj generacioj, kaj mi dissendis novjarajn libretojn kun tiu ĉi multlingva teksto. La alvokon „Sendu ĝin pluen“ aperigis ankaŭ Literární noviny (Literatura gazeto) en sia kristnaska aldono, kaj nome inkluzive de la intenco prepari el la kontribuajtoj libron. Mi povas diri, ke grandparte mi ne eraris pri la homoj. La entuziasmoj, kun kiuj mi kunlaboras pri la multlingvaj eldonoj de mia poezio kaj tekstoj, estis tiom koncernitaj, ke ili reagis tre bele kaj la tekston ili ne nur tradukis, sed alskribis ankaŭ alilingvajn mesaĝojn. Ĉe la laboro super la libro „Sendu ĝin pluen“ mi havis grandan honoron ekkoni brilajn homojn kaj mi esperas, ke ankaŭ novajn amikojn. Ĝi estas eĉ nekredebla kaj la kapo turniĝas por la feliĉo, kiom mirige al mia letero reagis la pentristo Zdeněk Hajný, nome ne nur per propra kontribuo kaj afabla permeso uzi lian bildon sur la kovrilon de la libro, sed ankaŭ per tio, ke kun la teksto li konatigis ankaŭ siajn plej bonajn amikojn kaj petis ilin ankaŭ pri kontribuajtoj. Mi estas feliĉa, ke al la legantoj kaj aŭskultantoj povas esti prezentita la libro, kiu estiĝis el la plej noblaj motivoj de multaj homoj.

Tio ĉi estas la inaŭguraj vortoj de Věra Ludíková en ŝia libro „Pošli to dál“, kiu en aprilo ĉi-jara aperigis la libroeldonejo Chronos en Prago. La libro enhavas mesaĝojn de nuntempuloj al la venontaj generacioj, tekstoj kaj poemojn ankaŭ diverslingvajn, pentraĵojn kaj ankaŭ kanton kun muziknotoj. Troviĝas tie ankaŭ kontribuajtoj de esperantistoj, la poemo „Tosto al Eŭropo“ de Eli Urbanová ĉeĥe kaj esperante, ĉeĥaj poemoj de Jiří Karen, Zdenka Bergrová kaj Čestmír Vidman, kaj ankaŭ saluto de pragaj esperantistoj. Vere unika libro, valora kaj bela.

Spisovatelka Věra Ludíková napsala vzkaz budoucím generacím „Pošli to dál“, který vydala jako ročenku v různých jazycích, mj. i v esperantu. Její vzkaz uveřejnily i Literární noviny a odpověděla jí řada básníků, spisovatelů, malířů a dalších umělců, mezi nimi i esperantskou básní s českým překladem Eli Urbanová. Vznikla tak „Kniha vzkazů lidem i vesmíru“, kterou vydalo pražské nakladatelství Chronos.

Božena Němcová

Saĝa montaranino

Foje estis du fratoj. Unu el ili estis riĉa bienposedanto, havis neniujn infanojn, kaj estis ege avara. La dua estis malriĉa barakulo, havis unusolan filinon kaj estis tro boneca. Kiam la infanino estis atingonta la dekduan jaron, li donis ŝin al la frato kiel anserpaŝtistinon.

Du jarojn ŝi servis por nutraĵo, post du jaroj ŝi plifortiĝis kaj rangiĝis je servistino.

„Servu nur, Manjo, ĝuste,“ diris ŝia onklo, „kiam vi ekiĝos, mi donos al vi anstataŭ la mono junbovinon. Mi ĝuste havas kvarsemajnan bovidinon, kiun mi plenkredos. Al vi certe ĝi plaĉos pli ol la mono.“

„Vij a scias tion bone,“ respondis Manjo, kaj ekde tiu tempo ŝi laboris kun ardo de fajro kaj eĉ krejceron ne perdis al la onklo.

Sed la onklo estis fripono. Manjo servis honeste tri jarojn kaj senparoloj. Sed la patro malsanetis kaj aĝiĝis kaj tial ŝi devis hejmen. Ŝi do postulis la junbovinon, kiu jam fariĝis ega bovino. Jen la onklo aliparolis pri sia promeso dirante tion kaj alion, ke li tiom ne donos, ke li tion ne promesis al ŝi, kaj volis la bedaŭrindan Manjon forrifuzi per kelkaj groŝoj.

Tamen Manjo ne estis tiel malsaĝa por akcepti la monon, sed hejme kun ploro ĉion rakontante al sia patro ŝi postulis, ke li iru al sinjoro prokuroro akuzi la onklon. La patro, kolere ekscitita per malkonscienco de sia frato, sen hezito iris en urbon kaj antaŭmetis sian akuzon.

La sinjoro prokuroro elaŭskultis lin kaj sendis por venigi la bienulon. Sed la bienulo bone antaŭsentis, ke li devos elliveri la bovidinon, se la sinjoro prokuroro ĉion iel ne aranĝos. Tial li klopodis Inĉini lin al sia flanko.

La prokuroro embarasiĝis. La riĉan li ne emis kolerigi kaj la malriĉa tamen siaflanke estis prava lazure. Li do verdiktis ruzmaniere. Li vokis al si ĉiun separate kaj donis al ili divenaĵojn: „Kio estas la plej akrosenta, kio la plej dolĉa, kaj kio la plej riĉa?“ kun la aldono, ke kiu divenos tion, tiu ricevos la bovidinon.

Ĉagrenaj foriris hejmen la fratoj pripensante dum la tuta vojo, kio ĝi eble povus esti, sed ne kunu ne kalia kapablis elpalpi la veron.

„Nu, kiel?“ demandis la edzino de la riĉa bienulo post lia reveno hejmen.

„Diablo prenu la juĝeojn, nun mi sidas en bela kaĉo!“ diris la bienulo kaj frapis per la putorbastono la tablon.

„Ho kaj kial, io al vi okazis, ĉu vi malvenkis?“

„Kio, malvenkis? Tute ne malvenkis, sed plej baldaŭ mi perdos la proceson. La prokuroro donis al mi enigmon. Kio estas la plej akrosenta, kio la plej dolĉa kaj kio la plej riĉa? Se mi tion solvos, mi stenos la bovidinon.“

„Bagatelaj problemoj pri la enigmo. Mi mem solvos ĝin. Kio povus esti pli akrosenta super nia nigra ŝpico, kio pli dolĉa krom nia barelo da mielo, kio pli riĉa ekster nia kesto da taleroj?“

„Vi pravas, edzino, vi solvis tion, la bovidino estas nia.“ Tiel trankviliĝis la bienulo kaj kun ega apetito konsumis kion la edzino preparis por li.

Siavice la barakulo venis hejmen plene malgaja, metis la ĉapelon sur la vesthokon kaj sidiĝis ĉe la tablo.

„Nu, kiel vi sukcesis, paĉjo,“ demandis Manjo.

„Ba, missukcesis. Ili estas sinjoroj, kiuj onin preskaŭ frenezigis!“

„Nu, kaj kio, do rakontu!“

La paĉjo rakontis per kio la prokuroro pritaskis lin.

„Nu kaj kio plie? Tion divenos mi mem, nur ne estu malgaja, matene mi tion diros al vi.“

Sed la barakulo tamen dum la tutega nokto maldormis. Matene eniras Manjo la ĉambron kaj diras: „Kiam la sinjoro prokuroro demandos vin, do diru, ke la plej akrosenta estas la okulo, la plej dolĉa la dormo, kaj la plej riĉa la tero, el kiu ĉio devenas. Sed tion mi diras, ne rakontu, de kiu vit ion eksciis!“ – La barakulo iris al la prokuroro, scivola, ĉu tia respondo estos la ĝusta.

La prokuroro vokis unue la bienulon kaj demandis lin pri la diveno de la enigmoj.

„Nu jes, mi opinias,“ respondis la bienulo, „ke nenio povas esti pli akrosenta ol mia ŝpico, kiu ĉion elsnufas kaj spurtrovas, nenio pli dolĉa ol mia barelo da mielo, kuŝanta jam kvar jarojn, nenio pli riĉa ol mia kesto da taleroj.“

„Kara bienmastro,“ diris la prokuroro, levante la ŝultrojn, „tio ne ŝajnas al mi prava, sed mi elaŭskultos kun kia diveno venis via frato.“

„Moŝta sinjoro, mi opinias, ke la plej akrosenta estas la okulo, la plej dolĉa la dormo, ĉar estante iel ajn malĝoja kaj lacigita, kiam oni domras, scias pri nenio, ja eĉ iufoje sonĝe amuziĝas, kaj la plej riĉa estas la tero, el kiu devenas ĉiu nia riĉaĵo.“

„Vi divenis kaj ricevos la bovidinon. Sed diru al mi, kiu diris al vi la solvon, ĉar mi scias, ke ĝi ne elkoviĝis el via kapo.“

Longe ne volis la barakulo eldiri, sed kiam la sinjoro tiom je li insistis, li konfuziĝis kaj malkaŝis la farinton.

„Do, bone, se via filino estas tiel prudenta, ŝi venu morgaŭ ĉe min, sed estu tiel nek tage nek nokte, nek en vestoj nek nuda, nek piede nek per veturilo.“

Jen estis por la barakulo nova ŝtono sur la koro.

„Kara Manjo!“ li diris veninte hejmen, „vij a bone tion aranĝis. La prokuroro ne volis kredi, ke tio devenas el mia kapo kaj mi devis diri, kion mi eksciis, kaj nun vi estas alvenonta ĉe lin, sed devas esti nek tage nek nokte, vi estu nek nuda nek privestita, vi estas venonta nek piede nek per veturilo.“

„Nu, kia bagatelko, nur ne okupiĝu pri tio, mi ja scipovos plenumi tion.“

Je la dua post la noktomezo Manjo ellitiĝis, prenis porgrajnan, tre maldensan sakon, surmetis ĝin, sur unu piedon metis ŝuon kaj duan piedon enŝuigis senŝtrumpe. Kiam estis duono antaŭ la tria, ŝi eksidis sur kaprion, kaj parte perpiede, parte rajde atingis la urbon. La sinjoro prokuroro rigardis jam tra l' fenestron kaj atendis la saĝan montaraninon. Vidante, ke ŝi tiel bone plenumis sian taskon, li iris renkonte kaj diris al ŝi.

„Nun mi vidas, ke vi estas sprita knabino; se vi volas, vi fariĝos mia edzino.“

„Kial ne, mi volas,“ rediris Manjo kaj okulmezuris la sinjoron prokuroron de l' kapo ĝis la piedoj.

La fianĉo prenis la belan knabinon subbrake kaj gvidis en la ĉambron. Poste li igis venigi la paĉjon, tajloron, kaj kudrigis robon por la estonta sinjorino prokuroredzino.

La tagon antaŭ la edziĝfesto priordonis la fianĉo al la fianĉino, ke ŝi neniam enmiksiĝu en liajn aferojn, nek en ajnan juĝproceson nek en ion alian, alikaze ŝi devos reveni al sia patro.

„Mi faros laŭ via volo,“ respondis la fianĉino.

Duatage okazis la geedziĝo kaj Manjo fariĝis grava sinjorino. Sed ŝi taŭgis en ĉio, al ĉiu estis afabla kaj amis edzon sian. Tial ĉiuj ŝin ege estimis.

Foje alvenis al la sinjoro prokuroro du kampistoj, unu havis virĉevalon kaj la alia ĉevalinon. Sed ambaŭ ĉevalojn ili havis kune. Kiam la ĉevalino ekhavis ĉevalidon, ekestis demando al kiu ĝi apartenas. La kampisto, kiu havis la stalono, asertis, ke laŭrajte apartenas la ĉevalido al li. La kampisto, al kiu apartenis la ĉevalino, pruvis, ke li havas pli grandan rajton je la ĉevalido. Tiel ili disputis ĝis ili aperis antaŭ la prokuroro. La kampisto, kies estis la stalono, havis grandan riĉaĵon, do li enmanigis al la sinjoro prokuroro kaŝflanke „bonan vorton“, kaj la stalono ricevis la ĉevalidon.

Sed dume la prokurora edzino en apuda ĉambro ĉion elaŭskultis kaj ne plaĉis al ŝi la maljusta verdikto de ŝia edzo. Post foriro de la pli riĉa kampulo ŝi manvokis la kampulon kaj diris al li flanke: „Vi naivulo, kial do povis okai, ke vi estis tiel blufita? Kiu iam aŭdis, ke virĉevalo havu ĉevalidon?“

„Nu vere, mi kompreneble opinias, ke al mi okazis granda maljustaĵo, sed kiam la moŝto tiel decidis, kion mi faru?“

„Mi kredas al vi, sed aŭskultu, kion mi diros al vi kun la kondiĉo, ke neniuj ekscios, kiu al vi donis ĉi kasilon. Morgaŭ ĉirkaŭ la tagmezo vi prenu reton, grimpu la proksiman monton kaj faru kvazaŭ vi kaptus fiŝojn. Mia edzo tiutempe preteriros kun kelkaj sinjoroj. Kiam ili ekvidos vin, ili demandos vin, kion vi estas faranta. Vi respondu al ili: Kiam virĉevaloj povas havi idojn, tiam ankaŭ sur montoj povas kreski fiŝoj.“

La kampisto pridankis la sinjorinon kaj promesis konduki laŭ la konsilo.

Duatage la prokuroro eliris kun kelkaj sinjoroj por ĉasi. Jen ili vidas jam de malproksime kampiston disetendi fiŝreton. Ĉiuj ekis ridi kaj atinginte la senperan supron ili demandis la kampiston, kio li faras surmonte.

„Mi kaptas fiŝojn“, respondis la kampisto.

„Vi freneza!“ kriis la sinjoro prokuroro, „Kiu dum sia vivo aŭdis, ke sur monto kreskas fiŝoj?!“

„Kiam la virĉevaloj povas havi idojn, povas surmonte kreski ankaŭ fiŝoj“, respondis la kampisto.

La prokuroro restis ruĝa kiel peonio, sed tuj li vokis la kampiston malsupren, prenis lin flanken kaj diris: „La ĉevalido estas via, sed unue vi diros al mi, kiu donis al vi tiun konsilon.“

La kampisto negis laŭ siaj ebloj, sed lastfine li tamen malkaŝis la edzinon de l'prokuroro.

Ĉevespere alvenas la prokuroro hejmen, sed ne atentante pri la sinjorino li reen-tienas tra l'ĉambro, parolas eĉ ne vorton kaj respondas neniun el ŝiaj demandoj. La sinjorino tuj ekpensis, kia forfikulo boras en lia cerbo, tamen pacience elatendis, kian finon ĉio ĉi atingos.

Post longa tempo la sinjoro edzo restis stari antaŭ ŝi kun nuboplena vizaĝo kaj diris: „Ĉu vi scias, kion mi ordonis al vi antaŭ la geedziĝo?“

„Mi scias tion, mi scias.“

„Kial vi do faris konsilon al la kampisto?“

„Tial, ke mi ne povas toleri maljustaĵon. La bedaŭrinda kampisto estis ruztrompita.“

„Li estu ruztrompita aŭ ne, vin tio ne koncernis. Nun revenu, de kie vi alvenis. Sed por ke vi ne diru, ke mi ne pritraktis juste, mi permesos al vi kunpreni de ĉi tie, kion vi pleje plaĉas.“

„Mi dankas vin, kara edzo, pro via boneco, kaj se ne povas esti aliel, mi obeos. Permesu, ke mi ankoraŭ lastfoje vespermanĝu kune kun vi, kaj nome tiel gaje kvazaŭ estu inter ni okazinta tute nenio!“

Manjo tuj iris en la kuirejon pretigis bonan vespermanĝon kaj preparis plej bonan vinon. Kiam la manĝaĵoj estis surtabligitaj, ambaŭ sidiĝis ĉe la tablo, manĝis, trinkis kaj babilis kvazaŭ dum festonado. La sinjorino tostis al la edzo sufiĉe kaj ofte kaj vidante, ke li estas jam ebrieta, ordonis al servisto, ke li enmanigu al ŝi ankoraŭ la plenverŝitan glason da vino.

„Kara edzo! Ĉi glason da vino eltrinku je mia sano kaj disadiaŭo! Post via plenumo mi iros hejmen!“

La sinjoro edzo prenis la vinon kaj per unu engluto eltrinkis ĝin je la sano de la edzino, sed jam apenaŭ regis la langon. Post momento lia kapo malleviĝis kaj li profunde endormiĝis. La sinjorino ĉion dosis, la servistoj surlitigis la sinjoron, poste prenis lin kune kun la lito sur la ŝultrojn kaj postiris la sinjorinon.

La patro interfingris la manojn vidante alveni al la barako malfrunokte la strangan procesion. Nur kiam lia filino tion klarigis al li, li estis kontenta.





La suno staris jam tre ale super la horizonto, kiam vekigis la sinjoro prokuroro. Li rigardas, frotas la okulojn kaj ne povas rekonsciiĝi, kio kun li okazis. Jen envenas tra l' pordo lia edzino en simpla, sed pura kopista jupo, kun nigra kufo surkape.

„Ĉu vi ankoraŭ estas ĉi tie?“ li demandis ŝin.

„Nu, kial mi ne estis? Mi jat amen estas hejme!“

„Kaj kion faras ĉi tie mi?“

„Ĉu vi ne permesis al mi, ke mi kunprenu, kion mi pleje ŝatas? Vin mi amas pleje, do mi kunprenis vin.“

La sinjoro prokuroro ekis ridi dirante: „Estu al vi pardonite! Sed mi vidas evidente, ke vi estas pli saĝa ol mi, do ekde nuna tago juĝos vi kaj ne mi.“

La prokuredzino ĝojis pro tio kaj ekde tiu tago ŝi juĝi mem, kaj ĉie estis bone.

(Tradukis Esperanto-rondeto en Most sub gvido de d-ro Josef Černý.

Tiu ĉi emitenta esperantisto forpasis antaŭ 20 jaroj, la 11-an de septembro 1983 en Náchod.)

### **D-ro Josef Kavka – honora membro de UEA**

La emitenta ĉeĥa esperantisto, membro de nia klubo kaj honora membro de ĈEA d-ro Josef Kavka, CSc., estis nomumita honora membro de UEA.

D-ro Kavka estas elstara fakulo pri la Esperanta faka terminologio, precipe pri la geologio, petrologio, mineralogio kaj ĥemio. Dum vico da jaroj li estis sekretario de Internacia Scienca Asocio Esperantista, redaktoro de Scienca Revuo kaj iniciativo kaj redaktoro de Geologio Internacia. Li kunlaboris ĉe la Esperanta versio de Poŝatlaso de la mondo, li estas aŭtoro de granda nombro de fakaj artikoloj konstanta partoprenanto kaj preleganto en la Konferencoj pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko.

Al d-ro Kavka ni sincere gratulas!

### **Prof. Jiří Hrcuba – 75 jara**

Nia samideano, kreinto de la ĝis nun nerealigita monumento de L. L. Zamenhof en la banurbo Františkovy Lázně, emitenta ĉeĥa vitro-gravuristo kaj medailisto Jiří Hrcuba fariĝos la 6-an de decembro 75-jara.

Li estas mondkonata artisto, juvel-, moner- kaj meda-faristo, fakulo kaj artisto en vitro-gravurado, -polurado kaj -facetado. Kiel profesoro kaj rektoro de Altlernejo de Dekoraciaj Artoj en Prago li estas aprezata preleganto en altlernejoj kaj universitatoj en Usono, Germanio kaj en aliaj landoj.

Al nia tre estimata samideano Jiří Hrcuba ni deziras multajn pluajn sukcesojn kaj prosperon en lia laboro!

## Fontano ne estas lavabo

„Mia avineto estas verda,“ diris Henriko.

Venĉjo ekridegis. La buboj kune vagis en Chotkovy-parko kaj promenis Bajajon, la grandan grandbuŝan sa-bernardan hundon, kiu dignoplene paŝis kun ili, sed poste ĝi ekkurissur herbobedo.

„Se ŝi estus flava, tiam ŝi havus flavmalsanon, rigardigis Venĉjo.

„La avineto de Henriko ne estas verda kiel mi,“ alparolis nikso la buben ĉe la kantata fontano. „Ŝi estas damo kun freŝa blanka haŭto kaj spite sian nemalgrandan aĝon ŝi estas tre belaspekta.“

La buboj iom konsterniĝis, ili ne komprenis, ke la avineto povus plaĉi al iu pro tiom evidentaj ammotivoj.

„Tion ni scias ankaŭ,“ rekonsciiĝis Henriko „Eĉ kiam ŝi estis aliĝanta al verduloj, ŝi demandis, ĉu ili akceptos ŝin, kiam ŝi propre estas griza.“ Kaj li sufiĉe grave emfazis la vortongriza, por instrui la nikson laŭ adekvataj rimedoj.

„Vi certe pensas, ke la rajton esti verdaj junuloj havas nu rvi,“ daŭrigis la nikso. La aĝo de la avino tute ne gravis por li. „Sed, sinjoroj, mi estas aĝa iom pli ol tri centojn da jaroj kaj estas same verda kiel via avineto, dum vi estas junaj maljunuloj.“

„Kio ni estas?“ ekvortigis ambaŭ samtempe. Kaj Henriko aldonis:

„Ni montros al ci! Bajajo, prenu lin!“

La hundo gaje alkuris kaj volis salti sur la nikson. Sed la nikso estis centjarulo rapidmova kaj malaperis diablo scias kien. Bajajo nur mallevis la orelojn.

„Hm...“ ĉirkaŭrigardis vane Henriko

Venĉjo etendis la manon en la fontanon, sed estis tio nura akvo.

Ili ĉirkaŭkuris la tutan Somerkasteleton de reĝino Anna, la belegan renesancan konstruaĵon, ili ĉirkaŭkurs ĝin dufoje kaj unu kontraŭ la alia, sed vane. Damnita nikso. Li preparos iajn kaptilojn por ilia avineto.

„Kial ŝi estas verda, estante propre griza,“ turnis sin poste Venĉjo al Henriko.

„Nu ŝi aliĝis al Greenpeace, tiel oni skribas tion, sed oni diras grinpis.“

„Aha, estas tiuj, kiuj ĉiam kontraŭ io ribelas,“ aldonis Venĉjo.

„Nu jes, almenaŭ do la avino per tio tedas. Ne rompu branĉojn, ne kuru en parko sur herbobedo, hejme ree – ŝanĝu la piedvestojn, nuraj tiaj komandoj. Ekzemple se mi ĵetus sur la vojon ĉifitan paperon kiel jen tiu virino, tiam mi devus la paperon preni kaj forporti ĝin en korbon. Se mia avineto scius, ke mi havas sprajilon – kaj por kio mi havas ĝin, tiam ŝi... Mi eĉ ne scias, kion ŝi... Alimaniere ŝi estas bona, sed ŝi estas frapita de la grinpiso. Rigardu, kuregas al ni Johano.. Fiii!“

Johano sur la vojo subite falkuŝiĝis.

La buboj kaj Bajajo kuris al li, Johano klopodis leviĝi, sed li ekjelpis.

„Kio estas?“ demandis Venĉjo.

„Mi glitfalis.“

„Ŝi ja forĵetis nur ian paperon.“

„Neee,“ kriis Johano, „tio ĉi estas glitiga ŝelo. Ve, mi ne pova leviĝi.“

„Kio okazis, knaboj,“ enmiksiĝis la sinjorino, kiu antaŭ momento forĵetis sur la vojon la ĉifitan paperon.

Nu ci estas la ĝusta persono, ekpensis Henriko.

„Sinjorino, vi ne devas perdi la tempon,“ li diris laŭte, „ni helpos lin mem.“

„Ni devus voki ambulancan,“ ne lasis sin rifuzi la sinjorino.

„Sensencaĵo,“ diris Johano.

Kaj Henriko kaj Venĉjo tuj faris el siaj manoj portilon, Johano fine starigis sin sur la sanan krupon kaj tiam sidigis sin sur la portilon. Kaj jam la buboj forportis lin. Bajajo malrapidis post ili.

„Knaboj, la gambon devas vidi kuracisto,“ vokis post ili la sinjorino.

„Li vidos“, ĵetis transŝultren Venĉjo. „Lia patro estas kuracisto.“

„Kion se oni engipsigos la krupon,“ lamentis Johano.

„Almenaŭ vi povus sur la Epsion spraji.“ Rimarkigis malserene Venĉjo.

La patro de Johano hazarde estis hejme li konstatis, ke la kruro ne estas trompita, kaj tuj la elartikigitan maleolon per faka tiro metis en la ĝustan pozicion. Johano eĉ ne sukcesis ekkrii. Li tre bedaŭris tion, eble la dolorkrio liberigus lin de la hejmaresto. Eble ne liberigus. Sed kun la kruro en bandaĝo li tamen nur lamirus. Plie paĉjo riproĉis al li, ke li ne estis atentema.

Panjo kompatis Johanon, sed ŝi ne kuraĝis oponi, nur poste estante sola kun la edzo ŝi memorigos al li, ke ankaŭ pli grandaj kulpintoj ol la nesingardemaj piedirantoj estas tiuj malordemuloj, kiuj ĵetas ŝelojn sur trotuaron. Kaj la Johano ŝi subŝovis du centkronajn monbiletojn, por ke li iru kun kamaradoj en sukeraĵejon, post kiam la kruro estos en ordo. Tion ŝi ne devis fari, Johano prefere sekrete krakmordis sukeron kaj difektis siajn dentojn. Sukerujo sufiĉis al li,, la monon li uzis por sia sekreta armilo. Tuj kiam li povis eksteren, li aĉetis kolorajn sprajojn. Li iris poste por Venĉjo kaj Henriko, por ke ili iru spraji kun li.

Kia estis ilia surprizo, kiam la belan surfacon de la cementmuro ili trovis jam surpentrita. Evidente ĝi estis verko de alia grupo de sprajuloj. La muro aspektis vere abomene.

Sed nemalproksime restis ankoraŭ alia cementa surfaco. La buboj tuj celis al ĝi kaj eklaboris.

Kiam ili estis en la plej intensa laboro, alkuregis al ili kvar buboj, multe pli grandaj kaj fortaj ol estis ili mem.

„Kion vi faras ĉi tie,“ ekkriegis unu el ili.

La buboj turnis sin, la murn ili nun havis malantaŭ siaj dorsoj, kaj kiam ili perokule mezuris la fortosuperecon, ili ŝajnis al si kiel la resto de la armeo de ĉeĥaj nobeloj en la batalo en 1620 sur Blanka monteto. La malvenko estis certa.

„Ni sprajas,“ sukcesis Henriko respondi, sed li apenaŭ kapablis tion findiri.

„Tio estas nia muro,“ eldiris krude alia bubo. „Ni kalkulos vian konton!“

Kaj antaŭ ol Venĉjo, Henriko kaj Johano ion ekkonsciis, ili estis mem de la kapoj ĝis kalkanoj prisprajitaj.

„Vi rajtas iri,“ permesis grandanime la tria el la venkintoj.

„Foriru en paco,“ aldonis la kvara kaj por adiaŭi li primarkis Johanon per lasta elŝpruco de sia sprajilo.

Johano, Venĉjo kaj Henriko ekkomprenis la vanecon de rezisto kaj treniĝis preter la malnovtempa Písek-pordego trans ŝoseo al Chotkovy-parko. Ili esperis lavi sin en la kantáta fontano.

„Rigardu, ree estas ĉi tie la nikso,“ diris Venĉjo.

Vere ĝi estis tie.

„Sinjoro nikso,“ vortigis Johano paceme, kaj li esperis ke savoporte, „sinjoro nikso, ĉu vi povus fari ion por ni?“

„Ha, ha,“ ridis la nikso, „vij a aspektas.“

„Nu, ĝuste,“ konfesis Henriko. „Ĉu vi povus de ni la abomenaĵojn forlavi?“

La nikso gratis sian verdan oreilon.

„Bedaŭriden, sinjoroj,“ li respondis. „Por tio akvo ne sufiĉas. Aliel ĝi estas elemento potenca kaj nekvietigebla, sed sprajaĵojn ĝi purin ne kapablas. Akvo estas tute malfeliĉa pro malpuraĵoj, kiujn homoj verŝas en ĝin. Sed ĝi povas transformi nur la naturan malpuraĵojn. Ĝin ĝi malkomponas kaj metas surfuje aŭ ĉeborde. Sed tiaj malpuraĵoj, kiaj estas sprajaĵoj, ĝin nur pereigas. Bedaŭrinde...“

„Nenion do ebals fari,“ ekkomprenis la buboj.  
„Do, ĝis revido, sinjoro nikso,“ diris Johano.  
„Ĝis revido,“ respondis la nikso.  
La buboj komencis pentan iradon al la hejmo. Kaj kio estos tie...  
„Eble,“ diris Venĉjo,“ spraji eĉ ne estas la plej bona afero... Kiam mi imagas, ke iu prisprajus la Kastelon aŭ la fontanon aŭ eĉ la Písek-pordegon...”  
„Nu ĝi aspektus terure,“ konsentis Johano.  
„Plej malbone estas, ke hodiaŭ eble venos al ni mia verda avineto,“ mallaŭte aŭdigis sin Henriko.  
„Ŝi ĉiam alportas ion por mi, hodiaŭ ŝi certe donos al mi nenion...”  
La verda avineto super Henriko nur ekploris.  
Sed la gepatroj de ĉiuj tri buboj furioziĝis. Kaj tial finiĝis la fabelo...

(tradukis J. Patera)

Zdenka Bergrová

## Ŝimmi

Ŝimmi estis la plej sagaca el ĉiuj ĉimpanzidoj kaj pro tio ekŝatis ŝin sinjoro František Benda, kiu pri ĉimpanzoj zorgis en zoologia ĝardeno. Estis al li permesite preni Ŝimmin hejmen, ŝi ludis tie kun liaj infanoj, Petro kaj Georgo. Pri nura ludado eĉ ne temus, sed Ŝimmi lernis kvanton da lertaĵoj, kiujn aliaj simioj ne scipovas. Sinjoro Benda legis, ke iu simio trankvile enĵetas moneron en aŭtomaton jak akiras plastan pokalon kun favorita limonado. Tial li instruis tion ankaŭ al Ŝimmi. Tio ankoraŭ ne sufiĉis al li. Infanaĝe sinjoro Benda estis skolto kaj ellernis la telegraf-alfabeton – la morsaĵon. Li instruis ĝis al siaj infanoj – kaj memkompreneble al Ŝimmi. Nu ŝi jam kapablis fari multon... Al la buboj sinjoro Benda aĉetis komputilon kaj ili baldaŭ ellernis uzi ĝin. Precipe ili ŝatis ludi. Ŝimmi rigardis, kiel ilit ion faras – kaj jen aspergilo al diablo – foje ŝi surprizis ilin. Ludi en komputilo ŝi kapablis tute bone. Ekde tiu tempo ili ankaŭ pruntedonadis ĝin al ŝi. Kiam ili estis en la lernejo, Ŝimmi ludis. Ŝi kreskis kvazaŭ akvumata kaj foje ŝin sinjorino Benda surprizis, kiam ŝi estis surmetanta ŝian jupon.

„Nu, Ŝimmi, ion ci...” ŝi koleris.

„Mi la jupon nur prunteprenis,“ diris Ŝimmi.

Kaj sinjorino Benda konsterniĝis. Ŝimmi parolas!

„Franĉjo, Georgo, Petro,“ ŝi vokis, „tuj venu ĉi tien, Ŝimmi parolas.”

Kia ĝi estis tumulto!

Kiel Ŝimmi akiris la kapablon... ĉar simioj jen tiel paroli ne scipovas... Kiam buboj ludis hokej, Petro estis arbitracianto. Li havis fajfilon. Ĝi iun tagon perdiĝis. Li serĉis ĝin, serĉis – vane. Tial la buboj aĉetis alian kaj pri la unua ili forgesis. Sed ĝi propre ne perdiĝis. Ŝimmi prenis ĝin kaj kaŝis. Ŝi volis sekrete lerni fajfi, ŝi provis tion kaj provis, ĝis ŝi erare la fajfilon englutis. Kaj subite ŝi komencis paroli. Eble la fajfilo kroĉiĝis en ŝia gorgo, aŭ kiu scias kiel tio okazis, koncize kiam ŝi volis forigi la fajfilon el la gorgo, subite ŝi ekkriis:

„Dammita fajfilo!”

Kaj ŝi mem eĉ ektimis.

„Al mi ŝajnas, ke mi parolas,“ ŝi meditis laŭte. Tuj ŝi kuris al spegulo, ŝi estis antaŭ spegulo tre ofte, ĉar ŝi estis vantema. Ni ne intencas kalumni ŝin, sed pri vero ni diru nur veron. Antaŭ la spegulo ŝi rondiĝis kontraŭ si la buŝon kvazaŭ ŝi volus kisi sin, kaj rigardas sin de maldekstre, ŝi rigardas de dekstre kaj malrapide prononcas:

„Ŝimmi estas lerta knabino. Ŝimmi scipovas paroli.“

Komence ŝi tion mallonge tenis sekreta, ŝi volis ŝoki la tutan Benda-familion dum iu tre solena momento, sed poste ŝi pretervole elbuŝigis, ke ŝi la jupon nur prunteprenis, kiam sinjorino Benda surprizis ŝin ĉe la paradado.

Nu kaj estis malkaŝite. La buboj ĝojkriis, sinjorino Benda skuis la kapon, sinjoro Benda gratis sin post la oreloj.

Kiaj estos la sekvoj? li diris al si. Ŝimmi estas nun la kompleta fabela unuaulo. Li povus propre proklami sin ŝia instrukciano kaj eble li akirus mondfamon. Sed – ĉio havas siajn limojn, eble la direktorko de la zoologia ĝardeno eĉ ne aprobus tion, kaj kion poste.

Nur Ŝimmi estis fiere trankvila – kaj sekrete ŝi jam komplotis.

La familio Benda ne povis longe teni sekreta, ke Ŝimmi parolas, ĉar tia simio silenti ne volas. Kaj Ŝimmi komencis uzi sian buŝon supermezure. La jupon de sinjorino Benda ŝi ellogis. Kaj al ĝi ankaŭ svetereton kaj ĉion, kion apartenas al belaspekta virina vesto. Ŝi aspektis en tio iom komike, sed – kiu fraŭlino ne aspektas komike, kiam ŝi pavas.

„Mi opinias, ke mi eble povus fariĝi akrobatino,“ ŝi diris foje dum vespermanĝo. „Aŭ mi povus vendi en sukeraĵejo.“

Sinjoro Benda nur ekĝemis.

Ĉe la direktorko de la zoologia ĝardeno tio finiĝis sufiĉe bonŝance, sinjoro Benda ne estis monpunita, sed la direktorko iel dume hezitis. Li diris:

„Kiam oni la mistifikaĵon malkovros, tiam respondecos pri ĝi vi mem, mi havas kun tio nenion, sed entute nenion komunan.“

„Memevidente, sinjoro direktorko,“ diris sinjoro Benda, riverencis kaj iris.

Kaj survoje hejmen li pretigis sin, kiel li insultos ŝin kaj kiel li nedonos ŝin en la zoologian ĝardenon, por ke ŝi ne ŝajnigu sin ia sorĉistino. Sed Ŝimmi ne estis hejme.

Kie Ŝimmi estis?

Sur la placo dismetiĝis pendoloj kaj karuseloj, ili ĝuste tie kolektis de publiko la enirpagon por ekvilibrista prezentado. Ŝimmi mallonge rigardis, poste ŝi sursaltis la podion, kie cirkestro anoncis, kio okazos, ŝi prenis paroltubon, kiu kuŝis tie, kaj voksciigis.

„Damoj kaj sinjoroj, kion vi dume vidis ĉi tie, tio estas nenio. Mi montros al vi, kiel oni devas moviĝi sur la ŝnuro.“

La cirkestro ne kapablis diri evorton, la spektantoj ekmurmuris kaj tuj poste ekregis kompleta silento. Kaj tiam jam Ŝimmi grimas sur eskalo supren, jam ŝi estis sur la platformeto de kiu etendiĝis la ŝnurego – kaj ŝi komencis fari sur la ŝnuro kapriolojn kaj transkapiĝojn, ke la spektantaro vere ion similan ĝis nun ne vidis. Krom eble en kinejo aŭ en la televido, kiam oni prezentis ian filmon el praarbo.

„Hooo, jels,“ aŭdiĝis de malssupre kaj Ŝimmi supre ĉe la transkapiĝoj ankoraŭ komencis kanti.

Ni forgesis al vi diri, ke ŝi ankaŭ tion ellernis. Ŝi aŭskultis la radion, kaj kiu melodio plaĉis al ŝi, tiun ŝi poste ripetis. La familianoj Benda sufiĉe multe ridis pro ŝi, ĉar ŝi ekzemple konfuzis du kanzonojn kune.

Sed nun ĝi estis granda sukceso. La publiko aplaŭdis, eĉ se ŝi faris sur la ŝnuro ion ajn. Ŝi eĉ ne emis iri malsupren. La cirkestro dume rekonsciĝis kaj kiam ŝajnis al li, ke la homoj vidis por sia enirpago jam sufiĉe li komencis sonoriti grandan sonorilon.

Ŝimmi ekkomprenis, ke ŝi devas fini, dum mallonga tempo ŝi riverencis kaj diversmaniere grimacis, la spektantoj aplaŭdis, tial ŝi ree riverencis, kaj poste ŝi tamen nur descendis.

Malsupre ŝi aperis tuj ĉe la cirkestro. Sed ĉirkaŭe amasiĝis la spektantoj.

„Kie vi tion ellernis, fraŭlino,“ vokis unu.

„Kie kaj kiel vi akiris la fraŭlinon, sinjoro direktorko,“ vokis al la cirkestro alia. Ili kriis unu trans alian – kaj en tiu konfuzo Ŝimmi sukcesis iom malprosimiĝi disde la cirkestro, ŝin postsekvis tuta grupo da admirantoj, kaj fine ŝi vortigis.

„Pardonu, damoj kaj sinjoroj, ne ke mi sentus min laca, sed tamen mi...” kaj ŝi vidigis, ke ili devus ŝin delasi el sia ĉirkaŭteniĝo.

„Vi cert volas alivesti vin el via laborvesto, ĉu,” ekkomprenis ŝiajn leporintencojn iu sufiĉe dika sinjoro kaj liamerite ŝi eliĝis el la grupo kaj – malaperis – kompreneble ne en la cirka budo, sed tute aliloke. Rap – ŝi entramiĝis kaj eskapis.

Hejmen kaj en la zoologian ĝardenon ŝi ne volis. Kaj ŝi malsatis. Sed kiel akiri ion por manĝi. Por ion aĉeti, por tio ŝi ne havis monon. Sed ŝi ekhavis ideon... Ŝi iris en parkon. Tie – ni devas tion malkaŝi pri ŝi – ŝi ŝirkolektis kelkajn manplenojn da ornamaj floroj. Preskaŭ ŝin ĉe tio kaptis gardisto, sed ŝi havis rapidajn simikruojn kaj li estis maljuna kaj korpulenta. Rapide ŝi ree forveturis senpage per tramo, kaj poste antaŭ granda gastejo ŝi haltigis tiujn, kiuj celis internen, kaj proponis al ili aĉeti la floretojn.

„Tio ĉi ja estas sukcesa reklamo,” ridis juna viro – kaj tuj li aĉetis al sia fraŭlino unu floreteton.

Do vidu, mi estas bona reklamo, ekpensis Ŝimmi, kaj proponis la floretojn plu. Ŝi perlaboris por bulkoj – en vendejo ŝi jam mem ŝajnigis sin esti reklamo. Dume estis vespero.

Ŝimmi ne volis reveni hejmen. Iom ŝi nostalgiiis pri la familianoj de Benda, sed – la libereco estas la libereco. Ŝi aĉetis ankoraŭ vidaĵkarton kaj skribis al Benda:

*Ne timu pri mi, mi ne perdiĝos en la mondo. Mi ree sendos al vi sciigon.* Kaj ŝi ĵetis la vidaĵkarton en keston. Sen poŝtmarko.

Eble ni forgesis diri al vi, ke Ŝimmi ellernis iom legi kaj skribi. Ŝi eklernis tion ĉe la buboj.

La familianoj de Benda tre ĝojis pro la vidaĵkarto, kiam ĝi venis. Ĉar sur ĝi ne estis poŝtmarko, ili devis pagi al la poŝto punmonon, sed ĝi ne estis tre granda. Ĉefe, ke Ŝimmi sendis sciigon pri si kaj ke ŝi ne estas senhelpa.

Kaj kion dume Ŝimmi? Vespere, antaŭ la tago, kiam ŝi forsendis la vidaĵkarton, ŝi sukcesis veni en krejon. Ŝi preterglitis tien, jam iom longe oni ludis, kaj tiel neniu haltigis ŝin.

Sur la ekrano kuris filmo pri Afriko.

Ŝimmi unuafoje vidis, kie ŝi havas la veran hejmon. Ĉimpanzoj tie saltis de branĉo al branĉo kaj ili estis feliĉaj. Ankaŭ ĉirkaŭe vagis rabobestoj, jaguaro tie kaŝiris kaj predis, sed – ĝi estis la ŝimpanza patrujo. Ankaŭ ni ne havas hejmon sen ĉiuj danĝeroj. Oni devas lerni vivi kun ili. La ĉimpanzoj ankaŭ.

Kiam la filmo finiĝis, Ŝimmi estis kiel prisorĉita. Nun ŝi sciis, kien ŝi volas veni, kie ŝi volas vivi.

Ŝi tranoktis en parko, en alia, ol kie ŝi ŝtelis florojn. – Ni bedaŭras, sed ni devas tion tiel diri. Ŝi ŝtelis florojn.

Ŝi surgrimpis arbon, bele ŝi apogis sin kaj dormis kiel en lulilo.

Matene Ŝimmi vekigis freŝa, ŝi ĝojis, ke sinjorino Benda ne devigas ŝin lavi sin kaj purin la dentojn.

Ŝi ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis proksime de la parko ŝarĝaŭtomobilon. Ŝi ekpensis, ke ĝi povus ŝin ien transit, kaj ŝi kaŝis sin sub la tolon. Estis tie pomoj. La ĉimpanzoj manĝas nur legomojn kaj fruktojn, nenian viandon; la pomoj estis por Ŝimmi bongustaĵo. Kaj tiel Ŝimmi denove faris malgrandan Delon, ni devas tion pardoni al ŝi, ĉar ŝi ne estis homo, ŝi estis simio. Kiam ŝi satmanĝis, ŝi trovis, ke la aŭtomobilo ekmoviĝis. Ŝi veturis en ĝi tre malproksimen ekster la urbo.

Ŝi lerte kaŝis sin, kiam la ŝoforhelpisto transdonis la kargon de pomo jen la tenejon, kie oni premas ilin je mosto. Preskaŭ okazis kverelo, ke la pomoj estis malpli multaj, ol estis en la liveratesto, sed poste oni tion iel ordigis. Kaj Ŝimmi trovis alian aŭtomobilon, ĉar tiu ĉi eble reveturos kaj pomojn ne plu transportos..

Ŝi havis bonŝancon, en la plua ŝarĝauto estis legomoj, florbrasikoj, tomatoj, brasikrapoj, kukumoj...

Kaj tiel Ŝimmi senĉese ŝanĝis la aŭtomobilojn, pecon da vojo ŝi ankaŭ veturis en kargovagono de trajno... Fine ŝi venis ĝis maro.

Estis tie grandaj ŝipoj, Ŝimmi elektris kargoŝipon kaj nokte ŝi kaŝeniris en la subferdekon.

Matene la ŝipo kelkfoje ekmuĝis kaj malrapide ekmoviĝis sur la maro.

Ŝimmi bonŝance trovis provizejo. Sed ŝi devis esti atentema, por ke dum la forportado de legomoj ne surprizu ŝin la kubisto, kiu ĉiutage miris.

Ĉu ni havas ĉi tie iun kaŝpasaĝeron? li meditis. Kaj li koleris, ĉar ĝuste legomojn li tre bezonis por maristoj kaj por pasaĝeroj sur la supra ferdeko. Ĉar kvankam ĝi estis kargoŝipo, kelkajn pasaĝerojn ĝi veturigis. Li interkonsentiĝis kun junmaristo kaj traesploris la subferdekon.

Ili ekagis saĝe senbrue.

„Jen ci estas,“ tondre ekkriis la kuiristo, kiam li kaptis Ŝimmin. Kaj li eltiris ŝin el la kaŝejo.

„Ne koleru,“ petegis Ŝimmi.

La kuiristo restis kvazaŭ ŝtoniĝinta. Li komprenis Ŝimmin, li estis ĉeĥo.

„Do ci ne estas simio, ci estas ia indianino, ĉu.“

„Ne, mi petas, mi estas afrikanino. Kaj mi volas veni hejmen, mi petas...“

Sed la petoj de Ŝimmi nenion utilis.

„Ha, en la maron kun vi,“ kriegis la kuiristo. Kuiri li scipovis eminente, sed alimaniere li ne estis bona homo.

Intertempe almalrapidis al ili ankaŭ la junmaristo. Ankaŭ li estis ĉeĥo, sed kiel la plimulto da ĉeĥoj bona knabo.

„Supre sur la ferdeko la sinjoroj havas nenian amuzon,“ li diris. „Eble parolanta simio amuzus ilin.“

„Kaj mi scipovas ankoraŭ danci kaj kanti,“ petegis Ŝimmi.

„Nu,“ gratis sin la kuiristo malantaŭ la orelo, „provit ion oni povas. Sed ci kolektos enirpagojn,“ li frape ordonis al la junmaristo.

Kaj tiel Ŝimmi venis supren sur la ferdekon. Ŝi dancis tie kaj kantis, distris la ŝipanaron kaj ankaŭ la kelkajn sinjorojn komercistojn, kiuj akompanis siajn varojn al Afriko.

Kiam la ŝipo ekankris, la kuiristo vane serĉis Ŝimmin. Li volis vendi ŝin en bazaro. Sed ŝi jam tute ne troviĝis sur la ŝipo. La junmaristo ĝustatempe helpis al ŝi fuĝi. Li eĉ promesis al ŝi sendi al la familio Benda per propra mono bildkarton kun poŝtmarko. Sed nun li mienis, ke kun ŝia fuĝo li havas nenion komunan. La kuiristo insultis, sed neniom helpis tio al li.

Ŝimmi lerte ĉirkaŭiris la havenon plenan de homoj, tiujn ŝi evitis, ŝi vivtenis sin per fruktos, da kiuj estis ĉie sur arboj sufiĉe. Bonŝance ŝi atingis paarbaron kaj trovis ĉimpanzan gregon.

Ŝi poste disvastigis en ĝi la progreson kaj klerecon.

(tradukis Jiří Patera)



Jiří Karen

Serĉado de la Blua Tono

Hledání modrého tónu

Poemciklo pri Fryderyk Chopin

Traduko Jiří Kořínek

LA UNUA SUKCESA KONCERTO

La 26-an de feb. 1832 okazis  
la unua publika koncerto de  
Fryderyk Chopin en Parizo

LETERO EL PARIZO AL VARSOVIO

Kio kaŭzas panjo  
ke mi lastatempe eĉ tro ofte  
surmetas pantoflojn de kolerego  
Kiel obsedita mi bataĉas en la klavojn  
Ne finas frazon

El la loĝioj  
ekflagris flametoj de juveloj  
Aplaŭde ekmuĝis la salonego

Chopin

Vi demandas paĉjo  
kiel statas pri nia afero en Parizo?  
Ĉi-tiea silko kaj veluro negocaĉas  
per vareto Polujo  
Baletoj Amuzvesperoj  
Amoraĵoj...

La bataloj ne venkigas militon  
La aŭtuno ne venas tial  
ke vi bruligis fajreton

Ĝuste nun en miajn fenestrojn vento frapas  
Mi aŭdas ĉevalajn hufobatojn  
Kriegad' sonigis la mallumon  
Eĉ ŝtonoj siblas en la strato  
„A bas le ministře  
Po-logne Po-logne“  
La amaso satkriegis Kapon klinis  
kiel kvieta grego  
Ĝi disiras hejmen

Ĉu vi scias  
al kiom da revoluciuloj  
malvarma akvo gutas sur kapon  
en Berlino en Lodź  
sur Špilberk?

Chopin

Ĉu vi ĝin scias entute?

La venkitoj ĉi tie ŝajnas  
esti frenezuloj  
Frenezuloj en maso

Decembro 1831

CHOPIN KAJ LA POLA EMIGRACIO

(Al D-ro V. Holzknicht)

Ho vi miaj karaj herooj  
ministroj kaj ambasadoroj de la emigrintoj  
En kunvenoj pri altrangoj  
En akademio pri Muzoj revii  
estas via modo  
kaj fanfaroni  
(„Ni okras je fusila pulvo kaj sango  
Ni gloraj Ni nobelaj Ni la unuaj  
Kun ordeno uniformo kaj frako  
Nur ni havas rajton  
je l' amara gloro de polaj emigrintoj“)

kaj kalumnii „Ĉi tie venas  
ia sinjoro Chopin  
kiu el la batalejo fuĝis sur padeto de muziko  
lu sinjoro opin  
Kiu ekzaltita pri franko  
Horojn trotas  
kaj aŭskultas kantaĵojn de kudristinoj  
(de tiuj grafinoj  
kiuj ĝojas  
kiam ili glitas vespere  
en ĉambrojn de siaj domaĉoj)  
kontraste ni...“

Ho vi miaj karaj herooj  
reĝoj ambasadoroj kaj ministroj  
mi batalas per kanto  
Miaj valsoj petas mondon pri helpo  
Miajn etudon mi ĵetas  
kiel tranĉe akritajn ponardojn  
alp opoj al caro  
Ribelige vokas miaj skercoj

Mi mobilizis la pianojn  
Taĉmentigis tonon  
Per frazo post frazo  
Mi doas al tiu kanajlar' respondon  
Spite me sonas eĉ la resol disko  
Miaj nokturnoj vekas el dormo  
la indiferentan konsciencon de l' mondo

VIZITO ĈE ADAM MICKIEWICZ

Etudo c minora  
donas  
ordonon el ekpafo  
de nevideblaj kanonoj  
Li kaŝis ilin en floroj

Eksonis  
en ili malĝojo kaj nostalgi  
Kaj timzorgoj  
Poste oni rakontas  
pri la bluo  
de la naska horizonto

Chopin ludis... Silentis...  
Timis la rimedoj  
pro la grandeco de celoj

**Ĉienské příspěvky na rok 2004**

Příspěvky Klubu esperantistů v Praze.  
Výdělečně činní členové i důchodci platí 80,- Kč  
nepracující důchodci, nezaměstnaní a rodinní  
příslušníci (ti bez Bultena) platí 50,- Kč.  
Je možno zaplatit i příspěvky Českému esp. svazu.  
Výdělečně činní 250,- Kč, nepracující důchodci,  
nezaměstnaní a studenti 150,- Kč, rodinní  
příslušníci 70,- Kč (bez Starta), nevidomí 25,- Kč,  
doživotní členství ČES je 5 000,- Kč, zápisné pro  
nové členy klubu i svazu je po 20,- Kč.  
Příspěvky je možno platit hotově na schůzi klubu  
nebo přiloženou poštovní poukázkou, kde je však  
nutno ve zprávě pro příjemce rozepsat zvlášť  
částku pro klub a zvlášť pro svaz.

KIAM CHOPIN IOMETE  
FANFARONAS

Kaleŝegoj brua Plumflirtas la ĉapeloj  
Ĉie rido ŝerco kaj spiritaĵo  
Ĉio al mi bonprosperas  
kaj prosperos ankoraŭ pli bone

Ĝus mi revenis de glora violonisto  
Per sekura arĉotiro li ludas naŭdek taktojn  
Li konatas kun la tuta registaro  
Kaj tiu ĉi homo vidas ĉion  
kiel mi tion bezonas  
Multon vi aĉetos per melodio

Hieraŭ min iu pentos en plenaero  
Kaj diris al mi (antaŭ ĉiuj)  
ke mi estas la plej glora pianisto de Parizo  
ke mia frapmaniero al li plaĉas  
Kaj ne nur al li (ankaŭ la virinoj)  
Ĉiu noto pura kiel perleto

Kun kiom da gloraj homoj mi proksimiĝas  
Dekste grafo Maldekstre princo  
Neniu diros „Tiu ĉi tono estis malĝusta“  
Post mi turniĝas markizinoj  
Kaj ke mi laŭdire havas pianon el sorĉita farejo  
kaj ke mi estis dizertulo de l' vespero  
Hieraŭ mi ricevis de Delfina laŭrokronon  
por mia takto  
Ne nur por miaj taktoj

Mi povas pri mi diri pravege  
„Jam longe neniu pianisto ĉi tie faris tian impreson  
Por mi mem mi estas plej bona komponisto  
Mi ĝojas pro ĉi laŭdo  
Ĉiu ajn envias min pro miaj ŝancoj  
(Apenaŭ iu mian pulmon kaj krutin ŝtupojn)  
Kaj poste... en la tuta mondo  
Min propre aŭdis ludi nur kelke da homoj  
Jes La pli malbonaj estas super la pli bona  
Kaj ofte enmalboniĝas  
kiu enboniĝis

LASTA LETERO DE DELFINA  
POTOCKA AL CHOPIN

Mi ĵetigas de flanko al flanko  
Via luna muziko giras en mia kapo  
La vintro diras riproĉe „Pensu pri Nico“  
Per plumtranĉil' mi plumon pritrancas  
Mia karul' verŝajne ĝi doloros

Mi rememoras kiel vi al mi venis  
dediĉi al mi komponaĵon  
kiel vi diris „Vi ravis min  
per via silentia parolo  
Per kantem' de ŝultroj kaj ĉarmo de haroj  
Kaj mi ne kredas eĉ a lunu el la klaĉoj  
Finfine Viaj mankoj  
estas por mi avantaĝoj“

Ĉu vi rememoras mia kara Ŝopeneto  
Ĉirkaŭ mi estis tiam  
tiom da dmindumemaj homoj  
Kial ili al mi naŭzis?  
Paroli kun ili! Pri kio? Vi ne kuraĝis kaj  
tamen vi subsentis en mia rideto instigon  
Via hontemo min emociis Mi estas pli aĝa  
kaj konfesas volonte ke pli sperta en la  
amo

Vi venis ĝustatempe  
Lacigita de ŝajne ĉarmaj estaĵoj  
mi ekkredis je vi kaj je via muziko  
Spurojn de sekreta konfederado mi ellegis el via  
vizaĝo

Estis en ĝi tiom da sensperta sopiro

Vi scipovis en mi veki revadon  
Tial mi diris al mi „Ne malutilos iom  
petolinciti Ŝopeneton“ Kaj tiam vi al mi ankaŭ  
en mian novembran solecon sendis rozojn  
kaj mazurkojn kaj ĉar a renkontiĝ' de emigrintoj  
ne avaras je vorto... koncize...  
mi estis la unua virino en la vivo  
kiu en vi vekis la viron  
(almenaŭ vit ion diris)  
Vi iris de mi malfrue hejmen  
La sonoriloj batis la kvaran sur Notre dame  
Pluv' komenciĝis (laŭdire obskura kiel plumbo)



Každý přinesl co napekl či co mu známá opatřila  
V svíčkách se tabule radostně rozzářila  
A předseda Patera (to je ten pán v čele s brejličkami)  
nás seznámil se zajímavostmi všemi

A pak se připíjelo a zákusky se pojídaly  
co dobré hospodyňky pečlivé na stůl daly  
A já jsem po chvíli (abych to ještě stíhal)  
se zatím odporoučel a k odchodu se zdvihal

a na Malou Stranu (tu s velkými písmeny) se vydal  
Pak od Malostranské stanice metra do kroku jsem přidal  
Jiného spojení na Malou stranu nemaje  
Protože snad kvůli dvacetistupňovému mrazu nejezdily do Hellichovky tramvaje

Dorazil jsem s kolegy Šolcem a Ogounem ještě před začátkem klání  
Co semí přihodilo o tom je jiný díl tohoto povídání...  
A sotva skončilo sponzorům děkování  
hned zase nazpátek do Smeček k navázání

vánoční esperantské nálady  
kdy znějí koledy  
všude na světě  
Ten klid a pohoda je zapotřebí na celé planetě

Připíjím na všechny lidi dobré vůle...  
Chybí jen závěr a úvodní preambule:  
Dneska mi poštou fotka přispěchala  
a připomenula jak ta valná sešlost 13.12. probíhala

Tam pod kabátů haldou zasedl jsem znova  
když už pan Patera dokončil svá esperantská slova  
(Jak ten čas neúprosně míjí!)  
Takže paní Maudrové dík za tu fotografii

Tady už žádné jiné komplikace nenastaly. Sblížili jsme se všichni lidsky  
Konec byl bujarý a nostalgický  
protože přijel i operní zpěvák z Ústí nad Labem  
kde se jak známo vždy esperantem řádně nadlabem

a zavzpomínali jsme na ústecká setkání  
a i další příznivce z mezinárodních festivalových střetání  
Tak znovu rázně v esperantský boj  
Esperanto Ponto inter nacioj

Ĉestmír Vidman

**Kaj ankoraŭ fotografiaĵo**

Plua fotografiaĵo minkatenis:

La saman tagon (13.12.01) kiam oni solenis  
en la gimnazio de Malá Strana malfermon de halo kiu nova mienis  
nian atenton alia aranĝo altrenis:

ĉe Venceslao placo proksime al la konstruaĵo metrostacia  
kaj areo kie ĉevalstatuo postenis  
estas strato Ve Smečkách – mallarĝa tia –  
de Pragaj esperantistoj tie okazis amuzo senceremonia

Ĉiu alportis kion li bakis aŭ kion donacis al li konatino afable  
En kandellumo ĝoje ekbrilis ĉio surtable  
Kaj la prezidanto Patera (sur kaploko kun okulvitroj) ne forgesis  
konatigi nin pri novaĵoj kiuj nin interesis

Kaj poste oni tostit kaj kukaĵojn manĝis  
kiujn zorgemaj mastrumantinoj sur la tablo aranĝis  
Kaj (por sukcesi ĉion fari) post momento  
mi levis min por foriri kaj adiaŭi por tiu tempo

kaj al Malá Strana (tiu kun majuskloj) mi miajn paŝojn irigis  
Poste de la stacio Malá Strana plirapidigi min instigis  
manko de konekso al haltejo Hellich-strata  
ĉar eble pro intensa frosto ne funkciis trafiko adekvata

Mi atingis la celon kun kolegoj Ŝolc kaj Ogoun ankoraŭ antaŭ la konkuro  
Kio okazis al mi tio estas jam alia aventuro  
Kaj tuj kiam finiĝis la dankado al sponsoroj mia spuro  
Kondukis reen al Smečky por uverturo

de la kristnaska bonhumoro  
kiam sonas kristnaska kant-adoro  
tra la tuta mondo en la sama atmosfero  
Sur la tuta planedo estas bezonata tia trankvilo kaj sendanĝero

Mi topas al ĉiuj homoj de bona volo  
Mankas nur enkonduka kaj konkluda protokolo:  
Hodiaŭ perpoŝte al mi fotografiaĵo alrapidis  
kaj memorigis kiel la ĝeneralan kunvenon la 13.12. oni gvidis

Sub amaso da surtutoj mi reeksidis  
kiam sinjoro Patera jam kun ĉiuj siajn Esperantajn vortojn dividis  
(Kiel la tempo senkompata mankas!)  
Al sinjorino Maudrová do por la fotografiaĵo mi dankas  
Neniuj komplikaĵoj plu estiĝis Homece ni intimiĝis ĉiuj kvazaŭ familie  
ĉio finiĝis viklece kaj nostalgie  
ĉar alveturis eĉ el Ústí nad Labem kantisto de operoj  
kie kiel oni scias ni ĉiam satiĝas de Esperantaj aferoj

kaj rememoris pri la Ústí-revidoj  
kaj pri pluaj favorantoj el internaciaj festivalaj kunsidoj  
Kun energio do e kal Esperanta fronto  
Esperanto Inter nacioj ponto

(Tradukis Jaroslav Mráz)

Čestmír Vidman

**Pocta Janu Nerudovi**

Co bude až tady nebudu  
nic vůbec nic  
Jenom se uzavře kniha osudu  
Dál bude v noci půlměsíc se usmívat  
a ve dne slunce bude hřát  
Co bude až tady nebudu  
Tak rád bych potkal Jana Nerudu  
Už na tom byl špatně s chůzí  
a z domu tuze těžce scházel  
jen když ho posluha doprovázel  
A víte jak byl stár když zemřel tehle kmet?  
Jen dva roky přes padesátpět let  
Ale co po něm zůstalo tu knih  
(přes třicet svazků je ve spisech sebraných)  
Přežívám ho už o čtvrt století  
a jen pár mých knížek se krčí v šupletí  
Ale už stoupám vzhůru  
výše a výše do azuru  
A hned ho vidím na obláčku jak něco píše  
zhlédnu na okraji  
v připravovaném Nebeském zpravodaji  
že tam doplňuje: vysaďte v kurzívě  
omlouvám se že vyrušuji  
zdravím uctivě  
a pak se představuji  
Říkám že jsem psával různé texty  
v kvartě a kvintě a také během sexty  
a že jsem absolvent malostranské Nerudovy reálky  
To ho potěšilo Zasněně se dívá do dálky  
jakoby zas viděl rodnou Malou Stranu  
kterou znal tak zblízka  
Psal o ní povídky fejetony a lokálky  
Asi se mu trochu stýská  
A jak tak plujeme oblohou  
sedám si mu u nohou  
Ty nohy v Darkově by mu byli  
určitě dokonale vyléčili  
že by zas byl jako kluk čilý  
Už zmizela Kampa labutě na Vltavě  
Dívá se na mne přemítavě  
A potom jakoby ho napadlo něco právě  
sundává cvikr na chvilinku  
a obrací se ke mně usměvavě  
Poslyš synku  
my bychom mohli znova  
zase pokračovat  
v Písniích kosmických  
abychom neztráceli cvik  
  
Hle mistr slova  
a jeho učedník

Čestmír Vidman

**Omaĝe al Jan Neruda**

Kio okazos post mia morto  
nenio kontinuos  
Nur fermiĝos la libro de la sorto  
Plu tra nokto la duonluno fluos sur la ĉielo ruze ridetante  
kaj tage brilos la suno konstante  
Kio okazos post mia morto  
Jan Neruda – lin volus mi renkonti nur por vorto  
Malfacile li iradis jam  
el domo eliradis li per paŝo peza  
nur helpe de servisto kompleza  
Kaj ĉu vi scias kiom aĝa estis li ĉe la vivo-fino?  
Sed kiom da libroj post li restas  
(en la plena verkaro da ili pli ol tridek estas)  
Mi transvivas lin je kvarono de jarcento  
kaj da libretoj miaj kaŭras en tirkesto de tiu nombro  
nur fragmento

Sed supren jam ascendas via spuro  
pluen kaj pluen al lazuro  
Kaj tuj vi vidas lin sur nubeto ion skribanta  
mi ekvidas lin sur margĝeno  
de preparata Ĉiela bulteno  
li kompletigas tie: per kursivo presu  
mi senkulpigas min ke mi ĝenas  
min prezenti al mi permesu  
kun respekto saluti konvenas  
Rakontas mi pri miaj tekstokanvasoj  
el la kvara ĝis la sesa klasoj  
kaj ke mi lernis en Malgrandurba Neruda-gimnazio  
Tio lin ĝojigis Malproksimen li rigardas kun nostalgio  
kvazaŭ li revidus sian naskiĝan Malgrandan Urbon  
kiun tiom li favoras  
Li verkadis rakontojn kaj sciigojn el ĝia medio  
Li sopire ĝin rememoras  
Dum ni sur la ĉielo navigas  
ĉe liaj kruroj min mi sidigas  
Liajn krurojn en Darkov oni estus  
resanigintaj La doloroj lin ne plu molestus  
li estus vigla kiel bubo Li sian resanigon festus  
Jam malaperis Kampa cignoj ne plu sur Vultavo glitas  
Min rigardante li medias  
Poste – verŝajne io lin ekscitas –  
por momento enmane kun la nazpinĉilo  
li turnas sin al mi kaj min invitas  
Aŭskultu filo  
klopodas li min instigi  
ni povus daŭrigi  
- por ke mi ne perdu lertecon –  
Kosmajn kantojn

Jen majstro de vorto  
kaj lia lernanto

(Jaroslav Mráz)